

EKO 2021

Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok
jaroj, de post 2013

2020: rekorda jaro:
kun 60 komunikoj

Subtene al la loka,
landa, faka kaj
regiona agado

EKO 2021-36 sendita el Budapeŝto la 27an de aŭgusto

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Germanio provas restarigi sin malvirtuale - NR

Ni planas la 19-an Novjaran Renkontiĝon (NR) por ĉi tiu jarfino, de la 27-a de decembro 2021 ĝis la 3-a de januaro 2022, en la junulargastejo de Wiesbaden, kie ni jam dufoje kunvenis. Eble ankaŭ vi ŝatos partopreni, same kiel la 48 homoj, kiuj jam aliĝis, http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr19_2.php

Jen la informoj kaj la aliĝilo,
<http://www.esperantoland.org/nr/#nr> kaj
<http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>

Pri la ebla realigo de NR ni scias, ke ni nenion scias (aŭ almenaŭ ne multon). Ni tamen preparu la renkontiĝon kaj esperu, ke la ŝtataj instancoj permesos al ni kunveni.

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

Norvega renovigo - NR

Nordio vere refortigas sin, elstare en Norvegio. Ĝia jarkunsido elektis novan estraron:

Bård Hekland, prezidanto
Jardar Eggesbø Abrahamsen, vicprezidanto
Marianne Lund, sekretario
Claude Rouget, kasisto
Lars Sandbakk, estrarano

Servo subtenata de
Universala
Esperanto-Asocio
kaj Internacia Ligo
de Esperantistaj
Instruistoj



EKO
logo

ENHAVO

- Novjara Renkontiĝo
- Norvegio: nova teamo
- Nova estraro de ILEI
- Nova estraro de REU
- Katolikoj kongresis.

La Estraro de ILEI 2021-2024

• **Prezidanto:** Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <mamduhi@gmail.com>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto en la estraro de UEA por ILEI kaj komitatano A ĉe UEA por ILEI.



• **Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>.

• **Estrarano pri financoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. <ilei.kasisto@gmail.com> (financoj). Tel. +374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <karinko_arm@mail.ru>. Ekzamenoj.



• **Vic-prezidanto:** Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <a.madella@tiscali.it>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado (foto sube dekstre)



• **Estrarano pri kongresoj:** Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <laura.brazzabeni@gmail.com>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Kongresoj, Lerneja agado.

• **Estrarano:** Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <mjerkovic@net.hr>. Lerneja kaj landa agadoj.



• **Estrarano:** Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Janeiro, BR-21220-310, Brazilo. <magisterpita@gmail.com>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.



• **Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado (kunlabore kun UEA), instrukapablado.



Komentario de EKO

Sume estas ok estraranoj, el kiuj kvin estas virinoj. Tio sekvas longan tradicion en ILEI pri akceptado kaj valorigo de virinoj. Logike, ĉar virinoj ludas signifan rolon en edukado ĝenerale. Ĝis 2024 ILEI devas pripensi minimume du fizikajn kongresojn, espereble tri, kune kun simpozioj kaj espereble AMO-seminarioj. Aparte por 2024, ILEI devas forte kunlabori kun UEA, jam frue. La respondeculoj pri landa kaj loka agado en UEA kaj ILEI forte kunlaboros. Pri ekzamenoj, indas krei kulturen ekzamenon por kompletigi la atingojn de tiuj, kiuj jam akiris KER-ekzamenon en lingva kapablo. Pri scienca agado, dezirindus, ke ILEI laboru por helpi al ISAE reveni al la mondo de bone funkciantaj Fakaj Asocioj aliĝintaj al UEA. En instrukapablado, necesas flegi pluirajn eblojn por kiam la kursoj en Poznano venos al fino. Indas evoluigi programojn per kiuj homoj netrejnataj pri edukado povus tamen gvidi kursojn.

Ankaŭ en Rusio okazis jarkunveno

Aŭgustofine en sanatorio «Kaspj» en Dagestano pasis la 31-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio. La Konferenco daŭrigis plejparte funkciadon de la nuna Estraro de la Unio, tamen kun kelkaj ŝanĝoj en la konsisto: Estas elektita nova estrarano — Abduraĥman Junusov, kiu, kiel profesia ĵurnalisto, okupiĝos pri amaskomunikiloj / eksteraj rilatoj; - Jelena Nadikova iĝis komisiito pri kreo de ILEI-sekcio en Rusio. Viktoro Aroloviĉ, kiu en la pasinta oficperiodo estis komisiito pri dokumentado, lasas tiun postenon pro aĝo kaj okupiteco pri profesiaj aferoj. La Konferenco dankas Viktoron pro bona multjara laboro.

La Estraro:

- Aleksandr Lebedev (Kovrov/Ivanovo), la prezidanto de REU;
- Svetlana Smetanina (Moskvo), 1-a vicprezidanto;
- Nikolaj Gudskov (Moskvo), 2-a vicprezidanto;
- Irina Gonĉarova (Odincovo), estrarano;
- Aleksandr Mitin (Niĵnij Novgorod), estrarano;
- Abduraĥman Junosov (Maĥaĉkala), estrarano.

Komisiito: Jelena Nadikova (Ĉeboksaro), komisiito pri kreo de ILEI-sekcio en Rusio.

Virtuala Kongreso de la katolika faka asocio

La Virtuala Kongreso de IKUE okazis ĉe la platformo ZOOM inter la 14a kaj la 21a de aŭgusto, t.e. inter la festotagoj de du ĉielaj patronoj de IKUE, Sta Maksimiliano Kolbe kaj Sta Pio la 10a, papo. La ĉiutaga programo estis oficiale kvinhora, sed plurfoje oni restis en agrabla diskuto. Al la kongreso aliĝis sepdeko da esperantistoj el 22 landoj (Aŭstrio, Benino, Brazilo, Britio, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kongo, Koreio, Kroatio, Kubo, Pollando, Rumanio, Slovenio, Svislando, Ukrainio) inter kiuj sesdeko aktive partoprenis (pluraj eĉ de la ripozlokoj aŭ de vojaĝoj).

La temo "IKUE: hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ" estis la okazo prikonsciiĝi pri IKUE kiel asocio kun pli ol centjara historio kiu dum sia historio havis plurajn obstakligajn periodojn. Oni pridiskutis demandojn kaj problemojn de la nuntempa agado de IKUE (internacia kaj de la sekcioj) kaj kiel plej rapide provu solvi ilin. La fina diskuto pri tiu temo estis ligita al la "Mi kaj IKUE": Kion ĝi signifas por mi; kial mi membras aŭ deziras membriĝi? Kion mi ricevis de IKUE? Kion IKUE povos fari por mi (kion IKUE alportis al mi)? Kion mi povus doni al IKUE kaj al la katolika E-movado ĝenerale? Pluraj promesis ankaŭ skribe respondi, kaj oni esperas baldaŭ kompletigi la diskuton.

La komuneco post la pasintjaraj Virtualaj tagoj dum la lastaj monatoj pli fortiĝis, kaj jam de pluraj monatoj la katolikaj esperantistoj renkontiĝas ĉe la platformo ZOOM ĉiutage je la 20:15, UTC+2 (informoj: ikue.reto@gmail.com).

Marija Beloŝević, prezidantino de IKUE

===== vortoj: 880 =====

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperitaj komunikiloj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al stefan.macgill@gmail.com. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.